


# TEA-BULTENO

**2ª JARO** | **DECEMBRO 1999** | **NUMERO 10**



## AGENDO



| | | |
|---|---|---|
| 1 | M | |
| 2 | Ĵ | |
| 3 | V | Novaĵoj el la reto |
| 4 | S | |
| **5** | **D** | **Tagmanĝo ĉe TEA-sidejo** |
| 6 | L | h. 17.00 - Legemuloj kurnvenas |
| 7 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| **8** | **M** | |
| 9 | Ĵ | |
| 10 | V | TAGO DE LA LIBRO |
| 11 | S | |
| **12** | **D** | **ZAMENHOF-TAGO** |
| 13 | L | h. 17.00 - Legemuloj kunvenas |
| 14 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 15 | M | |
| 16 | Ĵ | |
| 17 | V | Ekzercoj el LA PRAKTIKO - 1933 |
| 18 | S | h. 18.00 - Di-servo kun kantoj |
| **19** | **D** | |
| 20 | L | h. 17.00 - Legemuloj kunvenas |
| 21 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 22 | M | |
| 23 | Ĵ | |
| 24 | V | Sidejo fermita |
| **25** | **S** | |
| **26** | **D** | |
| 27 | L | h. 17.00 - Legemuloj kunvenas |
| 28 | M | Jarfina Festo: Bonvenon, Jaro 2000! |
| 29 | M | |
| 30 | Ĵ | |
| 31 | V | |











*Al ĉiuj Tea-Anoj kaj Gelegantoj*
*plej sincerajn bondezirojn*
*de Ĝoja, Paca kaj Serena*
*2000ª Jaro!!*





Post longtempa foresto, denove ĉe ni la

**ĵamaj Gekuiristoj**
**Susy kaj Silvio**

**Dimanĉon la 5ªⁿ de decembro**

ili proponos al ni menuon, kiun gustumi tute ne eblas en nia regiono. Certe ne estas bezonate, ke oni elspezu tiom da vortoj, por allogi vin: vi ja ĉiuj jam spertis iliajn kuirartaĵojn. Tial ni atendas vin multnombraj por kuna tagmanĝo, en gaja kaj amika etoso, je la 12.30 horo.

## *Zamenhof-Tago en Triesto*

### Dimanĉon la 12ªⁿ de decembro 1999

ni rememoras la 140-jaran naskiĝdatrevenon de nia Majstro per la tradicia renkontiĝo kun asocianoj - amikoj - simpatiantoj, laŭ la jena programo:


| | |
|---|---|
| h. 09.30 | Rendevuo en Placo Oberdan - kuna ekveturo direkte al Miramare |
| h. 10.30 | Vizito al la ekspozicio «Kristanoj el Oriento» |
| h. 13.00 | Tagmanĝo ĉe Junulara Gastejo TERGESTE |
| h. 15.00 | Promenado laŭ la marbordo. Reveno al la urbo. |

Pliaj informoj kaj nepraj antaŭmendoj ĉe TEA-sekretario, ĉiu-marde kaj -vendrede - h. 19.30-22.00 - 040 763128 aŭ, en la aliaj tagoj, ĉe Elda: 040 763244.

---



**Sabaton la 18ªⁿ**, je la 18ª horo, en la Preĝejo ***Madonna delle Grazie - Via Giustinelli 7*** - pastro Hans Ammer celebros esperantlingvan Di-servon. Dum la Meso la virina koruso IVAN GRBEC kantos kelkajn kristnaskajn muzikaĵojn. Sekvos bufedo en la surloka sidejo de la germanlingva komunumo.
Ankaŭ por ĉi tiu aranĝo ni esperas je via nombra partopreno.





## JARFINA FESTO

**Mardon la 28ªⁿ de decembro,** vi estas varme invitataj ĉe TEA-sidejo por amika kuntostado. Ho, preskaŭ mi forgesis: Kristnaska Paĉjo lasis sub la eta abio multajn donacetojn por vi ĉiuj... Do, vi estas atendataj ekde la 20ª horo.

---

***Bone sukcesu, sed ankaŭ nin ne forgesu.***

*L.L. Zamenhof*

## Mi legis en Esperanto de UEA, pri...

***Manifesto 2000 - verkita de Nobel-pacpremiitoj, ne alvokas aŭ petas superajn instancojn: ĝi apelacias al la respondeco de individuoj.***

Ĉiu homo havas la respondecon apliki al la realo la valorojn, sintenojn kaj kondutojn kiuj formas la bazon de la kulturo de paco, ĉar ĉiu povas agi por ĉi tiu celo kadre de sia propra vivmedio. Manifesto 2000 estis prezentita en Parizo la 4^an^ de marto, por kolekti subskribojn tutmonde. Oni celas prezenti 100 milionojn da subskriboj okaze de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en septembro 2000. UEA dissendos ĉijare faldfolion por kolekti subskribojn. Jam eblas subskribi ĉe www.uea.org.

**MANIFESTO 2000 POR KULTURO DE PACO KAJ SENPERFORTO.**


Konsciante pri mia parto de respondeco antaŭ la estonteco de la homaro, kaj tute aparte antaŭ la hodiaŭaj kaj morgaŭaj infanoj, mi devigas min en mia ĉiutaga vivo, mia familio, mia laboro, mia komunumo, mia lando kaj mia loĝloko:

- respekti la vivon kaj la dignon de ĉiu homo sen diskriminacio aŭ sen antaŭjuĝoj;
- praktiki aktivan senperforton, rezignante pri perforto en ĉiuj ĝiaj formoj: fizika, seksa, psiĥologia, ekonomia kaj socia, precipe rilate al la plej malriĉaj kaj la plej vundeblaj kiel infanoj kaj adoleskuloj;
- kundividi mian tempon kaj miajn materiajn rimedojn, praktikante malavarecon por haltigi forpuŝadon, maljustecon kaj politikan kaj ekonomian subpremon;
- defendi la liberecon de esprimado kaj la kulturan malsamecon, ĉiam favorante aŭskultadon kaj dialogon kaj ne cedante je fanatikeco, mensogado kaj malakcepto de aliaj homoj;
- favori respondecan konsumadon kaj evoluon, kiuj konsideras la gravecon de ĉiuj vivo-formoj kaj konservas la ekvilibron de la naturo sur nia planedo;
- kontribui al la evoluo de mia komunumo, kun plena partopreno ankaŭ de virinoj kaj kun respekto de la demokratiaj principoj, cele al kreado de novaj formoj de solidareco.

✯✯✯✯✯✯✯✯✯✯✯✯✯✯✯✯✯✯

*Per tia deklaro, pri kiu ni devas esti sincere, plene kaj enkore konvinkitaj, ni aliru la novan jarmilon kaj senhonte batalu (sen armiloj!), por ke finfine realiĝu la esperoj de ĉiu homo: esperoj pri tutmonda paco, vera demokratio, interhoma solidareco, respekte de la simpla esprimo: ne faru al aliaj kion vi ne deziras oni faru al vi mem!*

## Unu kliko



### kontraŭ la malsato en la mondo

*Ankaŭ interreto povas utili por batali kontraŭ la malsato en la mondo. Kvankam la iniciato tute ne havas ian ajn rilaton kun bonfaraj intencoj, ĉar oni celas nur akiron de nova klientaro, tamen la rezultoj estas pozitivaj.*

*Jen pri kio temas:*

Laŭ la Monda Nutrad-Programo de Unuiĝintaj Nacioj, je ĉiu 3,6-a sekundo unu persono mortas de malsato. El tiuj personoj tri kvaronoj estas infanoj malpli ol 5-jaraĝaj. Ĉi tiu situacio estas ĉie konata, sed unuopuloj, proprainiciate, ne multon povas fari por tion ŝanĝi. Nun estas la jena ebleco: en iu ajn libera momento de via tago vi povas partopreni en ĉi tiu homaneca, simpla ago: «KLIK' KONTRAŬ MALSATO». Oni kreis en interreto ejon por helpi la malsatantojn. Ĉe la alirpaĝo estas klikenda la kadreton «***Donate Free Food***». Je ĉiu klikado, grupo de sponsoroj kiu, en tiu ejo, reklamas siajn produktojn, transdonas al la Monda Nutrad-Programo la necesan sumon por nutri infanon dum kvin tagoj. Tio signifas: entute 10 manĝojn.

Ĉu profitodona tio por la sponsoroj? Certe ke jes, ĉar oni supozas ke, alirante tiun paĝon, vi ekvidas ankaŭ la propagandon. Do, tuj, senhezite kliku:

http://www.thehungersite.com

Atentu tamen ke oni povas kliki nur unu fojon tage: sed, farante tion ĉiun tagon de la semajno, vi helpas plurajn personojn. Tio certe ne solvos entute tiun gravan problemon, sed iel ĝi kontribuas al mildigo de la suferoj pro malsato de kelkaj infanoj. Sufiĉas eta kliko!!!

## Naiva Muso



Subtegmentejon iris mus'
Tre juna, sen la sperto.
Surloke renkontiĝis ĝi,
Imagu, kun vesperto.




Ektremis surprizita mus'
Kaj, reveninte kelon,
Ravita flustras al patrin':
"Mi vidis ĵus anĝelon!"

*Ludmila Jevsejeva (latvino, 1913-1980)*

## Kia estas la Esperanta hararstilo?



Afrika esperantisto, kiu fuĝis al Sudafriko el rifuĝejo en Tanzanio pro la malbonaj kondiĉoj kaj ĉar li ne povis studi, labori kaj progresi mense, establis malgrandan moveblan frizejon apud vojo kaj tie reklamas sian «**Esperanto Hair Cut**» per fotoj kaj desegnoj. Certe la preterirantoj demandas, kio estas Esperanto kaj kia estas Esperanta hararstilo! Laŭfote ĝi ne estas stranga, sed tute akceptebla vira modo. La adreso de la frizisto estas havebla ĉe raita.pyhala@lestijarvi.fi



*Zodiako de la jaro 2000. Bondezirojn!*

## Kristnaskaj kaj Novjaraj Bondezirkartoj

Grafikisto *Eraldo Sepulcri* preparis por Triesta Asocio tri diverstipajn, kolorajn poŝtkartojn, kun tre belaj bildoj, ĝuste por la venontaj festotagoj, kaj el tiuj unu speciale por la jaro 2000. Ili estas aĉeteblaj ĉe TEA: pri kostoj, sendado, rabatoj k.s. informas la kasisto.


BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# DECEMBRO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | Festo de Ĉiuj Sanktuloj | 6 Chanukah | 13 | 20 | 27 |
| Mardo | | 7 Chanukah | 14 | 21 | 28 |
| Merkredo | 1 | 8 Ekas Ramadan<br>Senmakula Koncipiĝo<br>Chanukah | 15 | 22 | 29 |
| Ĵaŭdo | 2 | 9 Chanukah | 16 | 23 | 30 |
| Vendredo | 3 Antaŭtago de Chanukah | 10 Chanukah | 17 | 24 Kristnaska Antaŭtago | 31 |
| Sabato | 4 Chanukah | 11 | 18 | 25 Kristnasko | |
| Dimanĉo | 5 Chanukah | 12 | 19 | 26 Sankta Stefano | |


# DECEMBRO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | Festo de Ĉiuj Sanktuloj | 6 Chanukah | 13 | 20 | 27 |
| Mardo | | 7 Chanukah | 14 | 21 | 28 |
| Merkredo | 1 | 8 Ekas Ramadan<br>Senmakula Koncipiĝo<br>Chanukah | 15 | 22 | 29 |
| Ĵaŭdo | 2 | 9 Chanukah | 16 | 23 | 30 |
| Vendredo | 3 Antaŭtago de Chanukah | 10 Chanukah | 17 | 24 Kristnaska Antaŭtago | 31 |
| Sabato | 4 Chanukah | 11 | 18 | 25 Kristnasko | |
| Dimanĉo | 5 Chanukah | 12 | 19 | 26 Sankta Stefano | |

## 5760 Hebrea jaro



**3-11 - Chanukah.** Tago de la Lumoj aŭ de la Sinofero. Oni rememoras pri la venko de Judaso Makabeo super la sirianoj kaj pri la puriĝo kaj sindediĉo de la Jerusalema Templo okazinta en la jaro 164ª a.K. Ĉiutage, post preĝa recitado, oni bruligas kandelon, starigitan en unu el la ok brakoj de la kandelingo, kies nomo estas *menorah*, ĝis kiam, fine, ĉiuj kandeloj iĝas brulantaj.

## 2559 Budhista Jaro

## 2055 Hinduisma jaro

## 1999 Kristana jaro

**8 - Senmakula Koncipiĝo (Katolika).** Oni celebras la dogmon laŭ kiu Maria, patrino de Jesuo, estis koncipinta senpeke.



**25 - Kristnasko (Anglikana, Evangelia, Katolika, Luterana).** Oni rememoras la naskiĝtagon de Jesuo Kristo. En la katolikaj landoj oni preparas la Kripon; en la tuta Eŭropo oni ornamas abion, bunte kaj brile, ĉar tiu arbo simbolas la manifestiĝon de Dio. Estas la plej grava festotago por la infanoj, kiuj ĝin atendas senpacience, esperante je nombraj donacoj.

**26 - Sankta Stefano (Anglikana, Katolika, Luterana).** Estas rememorata la unua martiro pro kristaneco.

## 1420 Islama jaro

**8 - Komenciĝo de Ramadan.** Temas pri tiu periodo, daŭranta unu lunmonaton, dum kiu - ekde tagiĝo ĝis sunsubiro - oni devas nek manĝi nek trinki nek fari iun aktivadon. Tiu fastado devas estis respektata de ĉiuj plenkreskaj kaj sanaj muzulmanoj. Nokte oni manĝas, festas kaj kantas, dum en la moskeoj oni preĝas kaj meditas.

5760 Hebrea jaro



3-11 - Chanukah. Tago de la Lumoj aŭ de la Sinofero. Oni rememoras pri la venko de Judaso Makabeo super la sirianoj kaj pri la puriĝo kaj sindediĉo de la Jerusalema Templo okazinta en la jaro 164ª a.K. Ĉiutage, post preĝa recitado, oni bruligas kandelon, starigitan en unu el la ok brakoj de la kandelingo, kies nomo estas menorah, ĝis kiam, fine, ĉiuj kandeloj iĝas brulantaj.

2559 Budhista Jaro

2055 Hinduisma jaro

1999 Kristana jaro

8 - Senmakula Koncipiĝo (Katolika). Oni celebras la dogmon laŭ kiu Maria, patrino de Jesuo, estis koncipinta senpeke.



25 - Kristnasko (Anglikana, Evangelia, Katolika, Luterana). Oni rememoras la naskiĝtagon de Jesuo Kristo. En la katolikaj landoj oni preparas la Kripon; en la tuta Eŭropo oni ornamas abion, bunte kaj brile, ĉar tiu arbo simbolas la manifestiĝon de Dio. Estas la plej grava festotago por la infanoj, kiuj ĝin atendas senpacience, esperante je nombraj donacoj.

26 - Sankta Stefano (Anglikana, Katolika, Luterana). Estas rememorata la unua martiro pro kristaneco.

1420 Islama jaro

8 - Komenciĝo de Ramadan. Temas pri tiu periodo, daŭranta unu lunmonaton, dum kiu - ekde tagiĝo ĝis sunsubiro - oni devas nek manĝi nek trinki nek fari iun aktivadon. Tiu fastado devas estis respektata de ĉiuj plenkreskaj kaj sanaj muzulmanoj. Nokte oni manĝas, festas kaj kantas, dum en la moskeoj oni preĝas kaj meditas.